EKO 2024

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

**Numero 2024:04, januaro 24. AMO kun programo**

Pezo: Word 40, PDF 350 KB, Alkroĉaĵo 135 KB. sume 525 KB

## La AMO-programo kiel planata por 2024

Malfacilas pretigi la plenan bildon pri AMO, sed gravaj atingoj jam videblas. Ni bonvenigas al la AMO-familio Albanion, kiu rapidege respondis al mia invito organizi seminarion. La numerigo por la jaro ekos per AMO-numero 108, sed devas ankoraŭ stabiliĝi la situacio por la numerado. La seminarioj estas konfirmitaj plene, se ne aperas kontraŭa indiko.

***Februaro***: Kroatio, Zagrebo. Pri Semajno de Internacia Amikeco (SIA). Prizorgota de Marija Belоŝeviĉ, membro de la aktiva AMO-komisiono. Feb. 24.

***Aprile:*** Kubo, Havano (apr.14-18) kadre de Landa Kongreso. Ioma financa helpo venu de UEA.

***Maje:*** Pollando, apud Vroclavo. Temo: 'Eluzo de la programo Erasmus'. Vidu sube.

***Julie:*** Brazilo: kun ILEI ene de la kongreso en Maceio (20-27). PLANATA.

***Aŭguste:*** AMO en la UK en Aruŝa, afrika temo. Ioma financa helpo venu de UEA. ESPLORATA

***Septembre:*** Tirana, Albanio (nova lando por AMO). Temo: 'La Esperanto-Instruado kaj ĝiaj nuntempaj defioj'.

***Oktobre:*** Francio, Greziljono, okt 21-30. Temo: pri junulara agado.

***Novembre:*** Kroatio, temo rilate al bibliotekoj kaj literaturo. Prizorgos Marija Belosevič. Nov 11-14.

**Decembre:** Plia seminario en Afriko?

***Ebloj sen konata monato:***

Ĉinio. En kunsido de IKEF, oni konsentis prizorgi seminarion, sed daŭre maleblas al tio asigni monaton.

Armenio: Principe konsentas okazigi seminarion, restas difini la monaton kaj temon.

Ni urĝas seminarianojn nepre anonci la seminarion en la Eventa Servo de UEA.

## Alvoko al eluzintoj de la programo 'Erasmus'

Lige kun la seminario en Pollando en majo, ni petas al tiuj, kiuj finuzis la meritoplenan programon Erasmus sendi pri tio koncizajn raportojn al Małgosia

Komarnicka kaj mi. Pluraj el vi povus ricevi inviton prezenti viajn spertojn dum la seminario: malgosia.junaamiko@gmail.com

## ILEI raportas

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri la dumonata agado, de novembro ĝis januaro. Jen la ŝlosilpunktoj:

- novaĵoj pri la 57-a ILEI-kongreso;
- raportoj pri la Zamenhof-tago kaj la Tago de la Esperanta Libro;
- invito al laŭvica ILEI-forumo por instruisto j'Lerneja Esperanto-agado';
- novaĵoj el sekcioj, inkluzive novajn afrikajn;
- grandioza Esperanto-Programo 2024 en Herzberg am Harz;
- evoluo de la kursaro Tibor Sekelj; kaj la Homa Ĉeno-9;
- dek kilogramoj de IPR kaj JA survoje al kvin afrikaj landoj;
- novaj kunvenoj de la retgrupo pri universitata agado;
- kunlaboro kun la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo (Hungario),
- Ĉina Radio Internacia, Zaozhuang-Universitato (Ĉinio),
- ILEI ĉe la 42-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO.

Ni alkroĉas la plenan raporton, malpeza je 135 KB.

## Universitatanoj kunvenis rete

La kunveno kunpensiga de la 8-a de januaro estis aparte interesa. Partoprenis pli ol dek gekolegoj. Unue Philippe Planchon donis informojn pri la kunveno pri konstruitaj lingvoj okazonta la 4-an kaj 5-an de julio en Orléans, Francio. Vidu informojn ĉi tie: https://icon2024.sciencesconf.org .

Sekvis raporto de Viko pri la stato de la kurso pri Esperanto por universitataj profesoroj en Sevilo kaj pri la kunveno en Hispanio pri Afriko kaj pri malkoloniado de la komprenoj pri Afriko, en kiu estis prezentataj du filmetoj produktitaj de esper-antistoj, unu pri la Universitato Espero en Kongo kaj unu pri la virina esperantista movado en Afriko: https://www.youtube.com/watch?v=Vv_doqUt_nU

Poste oni parolis pri la unua leciono de la kurso pri enkonduko al interlingvistiko de Aĥmad Mamduhi kun interŝanĝo de informoj kun Christian Lavarenne, kiu promesis interveni, kiam oni parolos pri la interlingvoj de la antikveco, ĉar li doktoriĝis pri la sanskrita kaj krome li promesis liveri materialon pri Balaibalano. Aldone Aĥmad donis informojn pri nova kurso pri Esperanto en irana teĥnika universitato.

Giridhar Rao prezentis la kunvenon 'Hajderabada Literatura Festivalo' kun aparta atento al lokaj lingvoj, kiun li partoprenos baldaŭ kaj en kiu li havos eblon informi pri Esperanto: https://www.hydlitfest.org/.

Nia kolegino Arko, estrarano de UEA, klarigis pri la ceremonio en la universitato Zaozhuang kun ĉeesto de la prezidanto de UEA.

## Konstruitaj lingvoj esplorataj en Francio

La dua eldono de la Internacia Simpozio pri Konstruitaj Lingvoj (I-CONLANG 2024) okazos ĉeeste komence de julio 2024 en Orléans (Francio). La ĉi-jara simpozio estas organizata de la Liĝera Lingvistika Laboratorio (LLL, UMR 7270 - Universitato de Orléans, Universitato de Tours, BnF, CNRS). La smpozio temas ne nur pri

Esperanto, sed ankaŭ pri aliaj konstruitaj lingvoj. La venonta eldono intencas doni al Esperanto la plej gravan rolon. La organiza komitato planas tri sesiojn, kaj la unua fokusiĝos ĉefe pri Esperanto. N aparte bonvenigas ĉiujn esperantologojn kaj interlingvistojn kontribui al la programo per proponoj pri Esperanto. Notindas ke krom lingvistika aliro al Esperanto (kaj al aliaj konstruitaj lingvoj), la simpozio bonvenigas prelegojn en aliaj fakoj, ekzemple laŭ la vidpunkto de la diversaj homaj sciencoj (historio, sociologio, psikologio, pedagogio, filozofio, lingvo-politiko, literaturoj kaj artoj, kulturaj studoj, komunikado ktp.). Alvoko pri la simpozio troviĝas ĉe la retpaĝo: https://icon2024.sciencesconf.org. La oficialaj lingvoj de la simpozio estos la franca kaj la angla. Oni povas sendi preleg-proponojn ĝis la **15-a de februaro 2024** (rekte sur la retpaĝo de la simpozio).

## ILEI atingas Universitaton en Kinŝasa

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Universitato UEC
Gvidantonomo: Aĥmad Reza Mamduhi. Aldoninto: fransoazo
Tipo: Nova universitata kurso
Loko: Baraka, Kongo DR
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27620

## Fondaĵo Canuto aktivos denove en 2024

Ni bonvenigas kandidatigajn mesaĝojn. Por la subteno de membroj nekonataj al UEA (sen UEA-kodo), necesas la sekvaj informoj:

Viro / virino
Familia(j) nomo(j), Persona(j) nomo(j):
Ĉe adreso devas aperi minimume la urbo. Pliaj informoj bonvenaj.
Naskiĝdato: Tre utila por UEA.
Telefonnumero: (ne nepre)
Retadreso: Nepre bezonata.

Datumoj por pluraj kandidatoj povas esti en unu sola listo.

## Zamenhofa Objekto unuafoje en Montrealo

La Kanada revuo ‘Lumo’ prezentas kunvenon kaj esperon por tiu lando. ZEO-j efektive helpas konigi al la publiko la ekziston kaj pluan funkciadon de nia lingva komunumo,




## Geonkloj daŭre valoras ĉe <edukado.net>

Tiu programo ligas spertajn esperantistojn kun novuloj. Skribas Katalin: ‘Ni fiere informas, ke nia programo estas ankoraŭ la plej populara kaj utila parto de nia retejo.

Ekde ĝia starto en 2016 ĝis la jarfino 2023 niaj geonkloj okazigis 4522 sesiojn. En tiu ĉi jaro la genevoj povis ĝui 514-fojojn helpon. En la plua parto de la teksto vi povas legi kiuj estis la plej diligentaj onkloj kaj kion ni faris dum la pasinta jaro.

Legu pli ĉe la paĝo: [https://edukado.net/novajhoj?id=900](https://edukado.net/novajhoj?id=900)

## Tajvano ja nevane havas Eo-vivon

La novjara evento okazis en Pingtung-urbo en suda Tajvano. Dekoj da homoj el ok landoj partoprenis ĝin ĝoje kaj vigle. Serioj de interesaj agadoj plenigis nian tagon kaj la bona vetero kompletigis la sukceson de nia aranĝo. La kunvenejo estas nova kafejo nomata *Wo Brunch*, kaj proksima al la Pingtung-stacidomo. Tio estas oportuna por homoj kiuj alvenis per trajno. Post tio, prezentis sin Teddy el Indonezio, kiu laboras kiel programisto en la norda Tajvano. Li montris la rilaton inter la indonezia lingvo, lokaj lingvoj kaj indiĝenaj lingvoj de Tajvano. Li montris la skribsistemon de indoneziaj lokaj lingvoj, kiujn li jam lernis.

En decembro 2023 okazis Zamenhof-festo en Bankoko, Tajlando. Partoprenis kvin homoj. Kvar tajlandanoj kaj unu ĉiliano. La programero komenciĝis de mi (Warut Bunprasert), kiu estis malfermo kun bondezira mesaĝo de Atusi Nisinaga, la prezidanto de KAOEM, kaj historieto pri Bankoka Esperanto-Klubo 'Verda Elefanto' kaj prezentis la libron Unua Libro en la taja lingvo. Poste estis prelego pri Zamenhof kaj la nuna situacio de la Esperanto-movado de Bharuj Rojanasoonthon (Ĵaz). Kaj la lasta prelego 'Ĉu Esperanto estas simpla lingvo?' de Cristian F. GUAJARDO YÉVENES, ĉiliano vivanta en Bankoko. Laste, ni kune manĝis kaj iris al la nacia muzeo kiel la lasta programero de la Bankoka Zamenhof-festo.

========= vortoj: 1220 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)




La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.  Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <[https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/](https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/)>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>.